


ROK XXV.
KWIECIEŃ
N-r 4.



JARO XXV.
APRILIO
N-o 4.

EL POLLANDAJ VIDINDAĴOJ.



Vidaĵo el valo de OJCÓW (Ojcu), celo de unu el dunkongresaj ekskursoj.

ESPERANTYSTA POLSKI
POLA ESPERANTISTO

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34
REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ
TADEUSZ HODAKOWSKI

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—.

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

1 strona	Zł. 60—
$\frac{1}{2}$ strony	" 32—
$\frac{1}{4}$ strony	" 17—
$\frac{1}{8}$ strony	" 10—

ANONCOJ:

1 paĝo	Zł. 60—
$\frac{1}{2}$ paĝo	" 32—
$\frac{1}{4}$ paĝo	" 17—
$\frac{1}{8}$ paĝo	" 10—

WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

Atentul Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado“.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—

Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

KORESPONDADO.

Nacilingvajn lernolibrojn instruantajn la legadon deziras interŝanĝi sendante rekompence postulatajn objektojn s-o **Michał Pękałski**, lernejestro en **Urzędów**, powiat Janów Lubelski, **Pollando**.

Oni petas afable alilandajn Esperanto-gazetojn represii tiun-ĉi anonceton pro granda ĝia propaganda signifo.

Bydgoszcz (Polujo) str. 20. Stycznia No 28. — S-o Zbigniew Woźniewski, gimnaziano kaj skolto, dez. koresp. per PI kun ĉiulandaj skoltoj.

Interŝanĝas PM. kaj il. pkartojn afrank. bildflanke. Respondas ĉiam.
Wilh. Lange, Eisleben. Petrikirchplatz 8. Germ.

Esperanto-verkistoj! Mi deziras interŝanĝi miajn: ĉeĥo-esperantan Lernolibron, ĉeĥo-esperantan Konversacion kaj NUR esperantan Legolibron (100 artikoloj) kun lernolibroj, vortaroj kaj legolibroj el ĉiuj landoj. Instruistino **Jule Šupichová**, **PRAHA II.**, Mala Stepanska 6/II., Ĉeĥoslovakujo.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXV JARO

KRAKÓW

KWIECIEŃ 1931 APRILIO

Nr 4 N-o

MONDVOJAĜO DE S-O J. R. SCHERER.

Bonegan ideon havis Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, elsendante s-ron Joseph R. Scherer el los Angeles en Usono, por okazigi propagandan vojaĝon tra la mondo. La persono de s-o Scherer estas konata al ĉiuj Esperantistoj pro liaj tre famaj intervjuoj kun la direktoroj de filmproduktejoj, kaj la legantoj de Heroldo de Esperanto ne unufoje havis la okazon admirii fluan kaj belan stilon de liaj artikoloj, laŭ kiuj li montriĝis tre sperta Esperantisto. Do komisiante al s-o Scherer tiun ĉi taskon, ICK faris tre bonan elekton.

Forveturinte el Kalifornio okcidenten, tra Havajaj insuloj li celis al Japanujo, „verda paradizo“ de Esperantistoj, post tiu lando sekvis Ĉinujo kaj post ĝi li venis Hindujon, por de tie tra diversaj landoj kaj ŝtatoj veni al la XXIII-a Kongreso en Kraków, kies li estas unua aliĝinto.

Dum sia vojaĝo s-o Scherer prelegas ĉefe en Esperanto, sed, se tion oni de li postulas, en aliaj kvar lingvoj, kiujn li ankaŭ flue parolas. Se la paroladoj estas destinitaj por vasta publiko, oni tradukas ilin el esperanto en nacian lingvon. Li disponas pri kelkdeko da diversaj temoj, kiujn oni povus dividi en tri seriojn: pri Ameriko, dumvojaĝaj impresoj kaj priskriboj, kaj al la lasta serio apartenas pure priesperantaj paroladoj destinitaj nur por Esperantistoj. Krom la lasta grupo ĉiuj prelegoj estas ilustrataj per lumbildoj, kies provizo ĉe s-o S. atingas 20.000 ekzemplerojn.

La paroladoj publikaj estas pagataj po 10 us. dolaroj, la paroladoj priesperantaj estas senpagaj, se tiuj ĉi du kategorioj okazas samloke.

Post la Krakowa kongreso ICK projektas organizi rondvojaĝon de s-o S. tra Eŭropo, kaj por Polujo ĝi destinas 6-tagan restadon de la 15 ĝis 21 de aŭgusto 1931. Oni devas bedaŭri, ke la tempo por la prelegoj ne estos tiam tro konvena pro libertempoj, malgraŭ tio ŝajnas al ni, ke por nia lando oni planas tro mallongan restadon de s-o S. Tial ni petas ĉiujn grupojn en Polujo pri tuja informdono al Pollanda Esperanto-Delegitaro, Kraków, Lubicz 34, se ili intencas aranĝi la prelegojn en sia urbo. Bone organizitaj ili povas doni eĉ rimarkindan profiton monan kaj la profito por la movado estas memkomprenebla. Do agu tuj! Al la temo ni revenos ankoraŭ. Krome atentu la ĉapitron „De la Redakcio“.

P. E. D.

MINEJAJ RIĈAĴOJ DE POLLANDO.

Sur teritorio de Pola Respubliko oni ekspluatas sekvantaj mine-ralajn riĉaĵojn: karbon (ŝtonan kaj brunan), rokoleon (nafton), teran vakson, minaĵojn de zinko, plumbo kaj fero, manĝo- kaj kali-salojn.

Ŝtonkarbo estas esplorita ĝis nun nur en la regiono de t. n. „pola karbo-mineja teritorio“. Ĝi troviĝas ĉe sud-okcidentaj limoj de la ŝtato kaj pliparte ĝi kuŝas sur pola teritorio. Malgrandaj detranĉaĵoj de tiu minejteritorio kuŝas ekster la limoj de Polujo: sur la teritorioj de l' Germana ŝtato kaj Ĉeĥoslovaka respubliko.

La teritorion de pola parto de la karbo-mineja regiono oni taksas je 3.800 km², kio formas ĉ. 72% de la tuta mineja teritorio. Sur tiu ĉi spaco la provizoj de l' karbo, taŭga por esti elminata, ĝis profundajo de 1.000 m, nombras proksimume 62 miliardojn da tunoj. Estas rimarkinde, ke la ĉi supra nombro ne enkalkulas ĉiujn provizojn de la karbo. Per boradoj oni pruvis, ke karbotavoloj atingas profundecon de ĉ. 2.200 m, kaj estas kredeble, ke eĉ sub tiu profundeco troviĝas ankoraŭ rimarkindaj kiomoj de bona karbo. Ĉe kalkulado de provizoj oni ne konsideris tavolojn kuŝantajn sub 1.000 m de la supraĵo, ĉar ĉe la nuna stato de l' mineja tekniko, kondukado de laboroj en tiuj grandaj profundajoj renkontas nevenkeblajn malhelpojn.

En okcidenta parto de la mineja teritorio oni renkontas ĉe minado tavolojn de la koaksigebla karbo. Jara produktado de l' koaksio en Polujo atingas la nombron de ĉirkaŭ 1.300.000 tunoj.

Dumjare produktas Polujo, ĉe normala konjunkturo, ĉ. 36.000.000 tunojn da karbo. Aktivaj estas ĉ. 100 karbominejoj.

Produktado de bruna karbo estas en Polujo malgranda, ĉar la konkurado de la ŝtonkarbo sur enlanda foiro estas tro forta.

La plej gravajn trovejojn de la bruna karbo posedas la Respubliko en Poznań'a vojevodio, okcidenta parto de Łódź'a vojevodio kaj suda de Pomerania vojevodio.

Nafto aperas en apudajo de Karpatoj kaj najbare kuŝantaj apudmontaj teritorioj. Akompanas ĝin ofte ter-gasoj kaj kelkfoje tervakso.

Konataj kaj parte ekspluatataj trovejoj etendiĝas de oriento, de la polrumana limo tra Kosmacz, Słoboda Rungurska, Mołotków, Pasieczna, Bitków, Perehińsko, Rypne al Borysław, Tustanowice, Mraźnica kaj Schodnica.

Plue al la okcidento ekzistas kelkaj zonoj, en kiuj oni nun elterigas la nafton.

La plej grava naftodona tereno estas de multaj jaroj Borysław kaj plej proksima ĝia ĉirkaŭajo. Tiu ĉi tereno donis ĝis nun 1.800.000 cisternojn da nafto.

Jara produktado de nafto en Polujo superas iom la nombron de 70.000 cisternojn (po 10.000 kg).

Proksimumaj, tre moderaj taksadoj donas nombron de 3.750.000 cisternojn da nafto sur tuta teritorio de Polaj Karpatoj.

Produktado de ter-gasoj koncentriĝas ĉefe en regionoj: Jasło

(jara produktado ĉ. 100.000.000 m³), Boryslaw (ĉ. 270.000.000 m³), Daszawa kaj Bitków.

Tuta produktado de la tergaso egalas, se temas pri ĝia hejta valoro, 400.000 tunojn da unuaranga ŝtonkarbo.

Tervakson oni minas nun en Boryslaw kaj Dźwiniacz.

Zinko-plumbajn minaĵojn oni ekspluatas sur la mineja teritorio (inter Olkusz, Tarnowskie Góry, Chorzów kaj Chrzanów).

Jara produktado de zinka blendo (ZnS) superas 200.000 tunojn. Plumbominaĵojn oni minas neplene 30.000 tunojn dumjare.

La minaĵojn oni fondas en minejfandejoj konstruitaj proksime al minejaj regionoj. Ĉe elfandado oni ricevas krome kadmon, troviĝantan kiel signifiva almiksaĵo en zinkominaĵoj, kaj arĝenton, kiel almiksaĵo de plumbominaĵoj.

Ĉe rostado de zinkominaĵoj oni ricevas, kiel kromprodukton, sulfuran acidon en kvanto de neplene 200.000 tunoj jare.

Ferajn minaĵojn oni renkontas preskaŭ en ĉiu vojevodio. Tamen rimarkindan valoron havas nur du regionoj: apud Częstochowa kaj Radom. En ambaŭ tiuj regionoj oni fosas minaĵojn etprocentajn (ĉ. 45% da fero post rostado).

Provizon de tiuj ambaŭ regionoj oni taksas je 150.000.000 da minaĵo.

Stonsalo aperas en Polujo en grandegaj kvantoj. La konatajn provizojn oni taksas je kelkaj miliardoj da tunoj.

Oni ekspluatas la salon en apudkarpata zono (Wieliczka, Bochnia, kaj bolejoj orient-malgrandpolujaj) kaj en vojevodio de Poznań kaj Łódź. (Wapno, Inowrocław, bolejo en Ciechocinek).

Produktado de la salo superas iom 300.000 tunoj jare.

Kalisalojn oni minas en tri minejoj: en Kałusz, Stebnik kaj Hołyn. Produktado atingas ĉ. 300.000 tunojn jare. Provizo de tiuj ĉi saloj estas rimarkinda.

Krome oni confirmis ekzistadon de kalisalaj kuŝejoj en vojevodio de Poznań.

Fine estas menciinde, ke Polujo posedas multajn mineralajn fontojn, precipe en apudkarpataj regionoj. Kelkaj el ili estas kaptitaj por kuracaj celoj, kiel ekz. Krynica, Szczawnica, Rabka, Iwonicz, Rymanów, Truskawiec kaj aliaj.

Dr. Czesław Kuźniar

Docento de geologio ĉe Minista Akademio en Kraków.

SANKTAJ SEMAJNO EN POPOLAJ SUPERSTIĈOJ.

Kredo al supernaturaj aperaĵoj en antaŭpaska periodo. — Sorĉistinoj kaj diabloj. — Rakontoj pri trezoroj. — Akvo kaj fajro. — Klopodoj de mastroj. — Miraklo de Reviviĝo.

Inter la popolo profunde estas enradikiĝinta la kredo al mirstrangaj aperaĵoj, estantaj verko de supernaturaj fortoj, penetrantaj en ĉiujn sferojn de homa vivo.

Tiuspecaj superstiĉoj estas plejparte alligitaj al datfaraj periodoj en la jaro, kun kiuj krome plej ekzakte ligas sin la kredo pri ĉeesto de mortintoj, donante al ritoj kaj agoj apartan koloron.

En paska periodo, staranta sur la limo inter vintro kaj printempo, signiĝas klare la kredo al „sorĉoj“ kaj supernaturaj aperaĵoj. Precipe la Sankta Semajno ¹⁾ abundas pri tiuspecaj superstiĉoj.

Jen ĝi estas periodo de vigligita agado de sorĉistinoj. La apud Ropczyce ²⁾ loĝanta popolo kredas, ke Sankto-vendrede ili ĉirkaŭveturas la preĝejon sur bakistaj ŝoveliloj, certigante al si tiamaniere feliĉon al laktajoj. Aliloke Sankto-vendrede, matenkrepuske, iras la sorĉulino ŝtelistsimile al la lago, lavas ĉiujn mastrajn vazojn kaj alportas sitelon da akvo hejmen, kie ŝi lavas per ĝi mamojn de bovinoj kaj ĉirkaŭincensas ilin per brionio, kio certigas al ŝi abundan melkadon ne nur de bovinoj sed ankaŭ de bovidinoj. De la elmelkita lakto ŝi faras rapide buteron por regali la diablon, venanta al ŝi por vizito. Malsupro-Laŭsicanoj ³⁾, por evitigi sin de sorĉulinoj, pasigas la Sankto-sabatan nokton sendorme.

Ĉe Huculoj ⁴⁾ regas kredo, ke en Sankta Jaŭdo la sorĉistino ligas en la preĝejo dum la legado de evangelio nodojn sur la ŝnuro. Se ŝi ligas du — „por ĝefianĉoj“ — la planita edziĝo ne efektiviĝos, se nur unu — „por la knabino“ — la knabino ne edziniĝos. La ŝnuron kun la nodoj la sorĉistino retenas ĉe si; la knabino nur tiam sukcesos edziniĝi, kiam la sorĉistino bonvolos malligi la nodon.

Krome la sorĉistinoj fuŝkuracantaj ligas la nodojn dum la legado de evangelio. Tiujn nodojn ili uzas kiel kuracilon, por forpeli la diablon (koboldon) ktp. Ĉe tio, malligante la nodon, ili diras: „Mi ne malligas nodon, sed malsanon“.

Krom la sorĉistinoj vagas tiutempe tra la tero la diabloj. Bulgaroj kredas, ke en Sankta Sabato terenvenas el lando de mallumo „nigra gasto“ alinome diablo. Ĉe ni, apud Nowy Sącz ⁵⁾ oni rakontas, ke en Palma Dimanĉo ⁶⁾ diablo restigas siajn trezorojn kaj kuras al la preĝejo por diservo. Kaj se iu en tiu tempo trovus lian trezoron, povus el ĝi laŭvole ĉerpi. En ĉirkaŭaĵo de Pińczów ⁷⁾ ekzistas la kredo, ke ĉiuj sorĉitaj trezoroj en kavernoj kaj arbaroj, garditaj de diabloj, restas libere dum mallonga tempo, kiam la pastro en Palma Dimanĉo, post la procesio, atendas malfermon de preĝeja pordo.

La kredo pri akireblo de riĉaĵoj en tiuj tagoj estas konata al multaj popoloj.

Ĉe ni oni kredas, ke satanoj en infero dum la tuta jaro laboras por en Granda Sabato preni la mondon en sian regadon.

Jen tiel super la antaŭfestotaga periodo en popola fantazio ŝvebas la mistera forto el sorĉolando. Do ne miriĝe, ke tiu forto estas prenonta ĉion per nevidebla reto de siaj influoj.

En distrikto de Zwiahel ⁸⁾ oni kredas, ke feliĉa estas tiu, kiu en tiu tempo mortas, ĉar ĉiuj tomboj estas tiam malfermitaj kaj la tero estos por li libera.

En ĉirkaŭaĵo de Gniezno ⁹⁾, kiam la infano ekmalsaniĝos en Palma Dimanĉo, oni antaŭdiras al ĝi certan morton, kaj eĉ la gepatroj iufoje ankoraŭ dum ĝia vivo jam mendas la ĉerkon.

En Podlasie ¹⁰⁾ oni timas precipe la homojn, naskitajn en Grand-Vendredo, ĉar ili havas okulojn „akrevidajn kaj nigrajn“, kiuj „ensorĉigas“ ĉion, kion ili rigardas: la homo kaj bruto ekmalsaniĝos, kaj la laboro malboniĝos.

Oni aljuĝas ĝenerale grandan signifon al ritoj kunligitaj kun la fajro bruligata en Granda Semajno.

En distrikto de Zwiahel nokte en Granda Sabato junaj vilaĝanoj ekbruligas la fajron sur la preĝeja tombejo kaj subtenas ĝin ĝis la tagiĝo. En kabanoj oni estingas la fajrojn meznokte, kredante, ke nur sorĉistinoj hejtas tiutempe.

En distrikto de Przemyśl ¹¹⁾ oni bruligas fajrojn apud la preĝejo, kaj la junularo aranĝas kuradon ĉirkaŭen; kaj la ligno por tiu celo devis esti nepre forŝtelita.

Kun la grandsemajnaj fajroj ligas sin diversaj superstiĉoj. Laŭ la mezjarcentaj predikoj (XV jrc.) oni ekbruletigas palisojn en la fajro el Granda Merkredo, por post ilia enteriĝo, vermoj ilin ne difektu. En Germanujo ĉe la unua plugado oni uzas lignokarbon el paska fajro. Ĉe Huculoj Grand-merkrede oni bruligas fajrojn inter la brutaro, „por ili estu ĉiam tiel videblaj, kiel la homo estas videbla ĉe la tablo, ĉe kiu li manĝas; por ke la brutaro estu ĉiam hela, kiel la Dia lumo; por ke al la brutaro ne havu alireblon la satano“. En kelkaj ĉirkaŭaĵoj de Huculujo (en Kosmacz) oni bruligas ankaŭ la fajrojn antaŭ la kabano dum Granda Jaŭdo, nomante ilin „tehetevo“.

Grandsemajnajn fajrojn oni bruligis ankaŭ por mortintoj, kies pruvo estas interalie la prediko de Miĥaelo el Janowiec el XV jrc, riproĉanta paroĥianojn pro la ekbruligado Grandmerkrede de ŝtiparoj, por memorajo de animoj al si agrablaj, ĉar „mensogas tiuj, kiuj asertas, ke la animoj tiun fajron alvenas kaj tie sin varmigas“.

Mencias ĉi tie mezepokaj skribaĵoj pri farado per akvo de diversaj sorĉaĵoj en Granda Merkredo. Tiuj ĉi sorĉaĵoj ĝisdaŭris nuntempon dum la Grand-semajno en multaj regionoj de Polujo kaj ĉe aliaj popoloj eŭropaj.

En Podlasie oni do kredas, ke se iu Grand-sabate la unua ekĉerpos la akvon, tiutage benitan, tiu havos en ĉio feliĉon.

Bano dum la Grand-semajno havas ankaŭ kuracan signifon; ĝi evitigas somere pri suna haŭtbrunigo. Kredo pri kuraca signifo de la akvo en tiu ĉi periodo estas ankaŭ konata en Normandio.

Multaj praktikoj kaj agadoj rilatas ankaŭ ĉiujn mastrajn laborojn.

Jen en ĉirkaŭaĵoj de Kielce ¹²⁾ Grand-vendrede, antaŭ la sunleviĝo la mastroj eliras sur siajn kampojn kaj fiksas sur ili lignajn krucetojn, kiel ŝirmon kontraŭ la epidemio. Apud Sławków ¹³⁾ tiaj krucetoj estas faritaj el avelujaj bastonoj, benitaj kune kun la palmoj. Ili estas fiksataj en la tero dum la Palma Dimanĉo.

En la urbeto Żołynia ¹⁴⁾ (distrikto Przemyśl) kaj en la distrikto de Brzozów ¹⁵⁾, kiam Grand-sabate oni sonorigas je „Gloria“, la mastroj skuas la fruktarbojn, por ke ili vekigu de la dormo kaj fruktnaskadu. En provinco de Sieradz ¹⁶⁾ kaj Wilno ¹⁷⁾ oni rekomendas semi la pizon Grand-vendrede, por ke ĝi abundu.

Mazuroj prusaj plantas en la Granda Jaŭdo markotojn de florphantoj, kaj ankaŭ aliplantas la potoflorojn.

En mastraj agadoj oni ligas ankaŭ grandan valoron al la „palmo“, t. e. branĉo de saliko, benita dum la Palma Dimanĉo: ĝi ŝirmas de malsanoj, kaj tondrobatoj, kaŭzas prosperan brutobredadon kaj fine oni uzas ĝin dum la semado.

Multaj reguloj kaj malpermesoj eniras dum la Granda semajno en ĉiujn sferojn de la ĉiutaga vivo.

Jen ĉe la popolo en ĉirkaŭaĵo de Ropczyce oni malpermesas sinkombadon en Granda vendredo, kaj kiu tion ne obeus, baldaŭ estos senhariĝinta. Ĉe Mazuroj prusaj kaj en Germanujo tiu ĉi malpermeso entenas ankaŭ Grandan vendredon kaj Paskan dimanĉon, krom tio ĉe Mazuroj prusaj oni kredas, ke sinkombado dum tiuj ĉi du tagoj efikos, ke la kokaro gratdetruos en la ĝardeno.

Apud Iwaniska virinoj evitas panbakadon en Granda vendredo, timante la tondrojn.

Blankrutenoj festas la Grandmerkredon, nomante ĝin „hajla". Se iu tiun ĉi festotagon ne observus, la hajlo somere pereigos ĉiujn semajojn. Ankaŭ en multaj regionoj ekzistas malpermeso ŝpini de post Granda Jaŭdo ĝis Pasko.

En Slovakujo Grand-jaŭde oni klopodas fini la laboron en teksokadroj por ilin el la loĝoĉambro forigi.

En ĉirkaŭaĵo de Gniezno oni diras, ke tiu, kiu ne lavas la to-lajon en la Granda Semajno, tiu havos hejme malsanon.

Huculoj malpermesas en la Granda Vendredo paroli pri la ser-pentoj, por ne kaŭzi tiamaniere ilian mordadon en la somero.

La popolo apud Ropczyce Grandsabate ĉirkaŭkuras la domon kun la ŝlosiloj, por tiamaniere evitigi sin de ratoj kaj musoj. En Slo-vakujo samcele la knaboj ĉirkaŭkuras la domojn kun tondiloj.

En Ukrainujo en Granda vendredo la pastroj metas sur la tom-bo de la Savinto panbulon. Dum la unua postpaska dimanĉo oni dis-donas ĝin al mastroj, kaj ĝi estas servonta kiel kuracilo por homoj kaj brutaro.

Grandsabate dum la meznokto la miraklo de Reviviĝo ĉesigas la satanajn fortojn. Ĝojo ekregas la tutan mondon. La suno baraktas kun la luno kaj mirindajn dancosaltojn estigas sur la ĉielo. Ekfloras arboj kaj floroj. Alparolas el profundaĵoj de akvoj la sonoriloj.

Kaj la homoj, neniam pri ĝojo kaj mirindaĵoj sataj, serĉas ilin senlace ĉirkaŭ si kaj en profundoj de propraj koroj.

K. Z-cz.

Laŭ la artikolo en Ilustrowany Kurjer Codzienny tradukis **Theta**.

—oŝo—

Prononcaj kaj objektaj klarigoj. ¹⁾ La semajno antaŭanta la Paskon estas nomata „granda"; ĉi tie parolante pri la semajno kaj ĝiaj tagoj ni uzis samsignife la vortojn „granda" aŭ „sankta". ²⁾ Ropĉice — urbo oriente de Kraków. ³⁾ Slava popolo en limoj de la germana ŝtato, loĝanta parte en Saksujo, germane nomata Wenden aŭ Sorben, pole Dolno-Łużycanie. ⁴⁾ Popolo en sud-orienta Polujo. ⁵⁾ Novi Sonĉ — urbo sudoriente de Kraków. ⁶⁾ La lasta dimanĉo antaŭ Pasko. ⁷⁾ Pinĉuv — urbeto en vojevodio de Kielce. ⁸⁾ Zvjahel — urbo en nuna Sovetujo. ⁹⁾ Gnjezno — unu el plej antikvaj polaj urboj en apudaĵo de Poznań (germ. Posen). ¹⁰⁾ Podlasje — provinco oriente de Varŝavo. ¹¹⁾ Pjemisl — urbo inter Kraków kaj Lwów. ¹²⁾ Kielce — vojevodio (departementa) urbo. ¹³⁾ Sŭavkuv — urbeto apud Kielce. ¹⁴⁾ Jouinja. ¹⁵⁾ Bjozuv. ¹⁶⁾ Sjerac — okcidente de Varŝavo. ¹⁷⁾ Vilno.



PRINTEMPE.

Adolf Dygasiński estis plenmerita populariganto de scienco, tradukanto kaj pedagogo. Krome en periodo de 20-jara verkista laboro li verkis ĉirkaŭ 40 rakontojn kaj novelojn, en kiuj kun vera gracio li pentris polan pejzaĝon kun tio, kio ĝin plenigas, la vivo de la vilaĝan popolon, kaj precipe la vivon de bestoj, kies Dygasiński estas majstra konanto kaj profundsenta amanto. — La esperantistoj povas bone ekkoni la altan valoron de Dygasiński el la ĉarma novelo: „Lupo hundoj kaj homoj“ tradukita de nia eminenta kunlaboranto, pri kiu ni ĝuste fieras, kaj tradukinto de kelkaj verkoj en Esperanton — s-o Bronisław Kuhl.

ADOLF DYGASIŃSKI.

Kun varmo, lumo, odoro kaj kanto alvenis la printempo. Arbaroj kaj arbaroj, kampoj kaj herbejoj ekbolis de vivo. Tie piceo kaj pino eligas novajn branĉojn, kiuj ĉirkaŭvolvitaj per junaj belaj pingloj kiel krucoj supren celas.

Kaj ĉi tie elrampas el la tero iaj plantetoj paleverdaj, preskaŭ palaj. La plej aĉa herbeto, kiu jam mizeris, kiun oni piedpremis kaj al la tero albatis, penas nun al la vivo sub granda signalo de reviviĝo. Disjetitaj sur la sabloj tie kaj ĉi tie, ekkreskas kanecaj herbotufoj, kronetoj de sedoj kaj timiano. Verbasko renaskiĝas, prunel-arbustoj kaj erikoj ekburĝonas. Ventumiloj de filikoj kreskas el muskovritaj tordajoj, similaj al birdaj idoj en lanugo, kaj likopodioj per longaj vostoj grimpas sur la tero.

Ekkoloriĝas la tero pro herboj, ranunkoloj, anemonoj, primoloj, konvaloj, violoj. Jen jam verdiĝas betuloj kaj kverkoj, salikoj, frakosenoj, tremoloj, kaj sur paŝtejoj la paŝtistoj ludas la ŝalmojn.

En formikaj montetoj movado nemezurebla; iliaj loĝantoj disiras por laboro foren tra la mondo. Burdo ĉirkaŭflugas la arbaron kun muziko, kiu sonas kvazaŭ kordo, unufoje ekmovita kaj ĉiam vibranta. Abelo kaj papilio unuajn mielojn deprenas de la floroj. Elrampis al la taga lumo raŭpoj, kreaĵoj strang-staturaj: unuj glataj, longaj, vilaj kaj malhelaj kaj helaj, unukoloraj, aŭ jen okulofende makulitaj kaj striitaj, iaj kornhavaj, kun piedoj kiel la dentoj de segilo — treniĝas sur la tero, sur folioj, kaj aliaj kontraŭe, kvazaŭ rigidaj kuŝiĝis senmove, kelkaj volviĝas, turniĝas, fleksiĝas kiel serpentoj. Araneoj en truoj de arbokavaĵoj kaj inter branĉoj rapideme dispendigas la retojn, kaj algluiĝintaj per haŭto al ŝelo de arboj, al folioj maturiĝas larvoj de diversegaj insektoj, pli strangaj ol raŭpoj.

Susuras sub la piedoj malnovaj strobiloj, sekigiĝintaj folioj kaj kraketas sekaj branĉetoj; inter ili ofte vi renkontas neloĝatan konkond de limako aŭ sekigitan skeleton de skarabo.

Ĉe ĉiu paŝo ŝirekflugas el la herbo svarmoj de muŝoj, aroj de cikadoj diskuras ĉiufanken en eksterordinara paniko. Ĉiama timo ŝajnas restadi sur fundo de volupta pokalo de la vivo. Almetu ia orelon al la kelkcentjara kverko kaj aŭskultu zorgeme, kaj vi aŭdos interne frapsonon obtuzan, ronkadon kaj elmordadon. Estas kreaĵoj, okupitaj de fervora laboro pri detruo de la maljuna grandegulo. Ili ĝiajn intestojn ŝiras, kaj ĝi ensuĉiĝis sin per branĉegoj de radikoj, enprofundiĝis en ĝin per longaj kvazaŭ ungegoj, per krono de brilaj folioj ĝi helas en radioj de suno, vi dirus — nedetruenda, senmorta.

Kaj ja la tempestoj frakasis ĝiajn branĉojn. Pro tio sur la trunko grandegaj cikatroj, grandegaj tuberoj, kiuj putras kaj en internon de la kverko permesas invadi al diversaj vivaj kreaĵoj. Dum daŭro de jarcentoj de ĝia vivo alkuris ĉi tien, evidente, iu terura uragano kun tondroj; la kverko volis ĝin kontraŭstari kaj ricevis grandan vundon, kiun ĝi kun fiero portas kiel ateston de forto antaŭ la tondrobatoj. Kiaj muskoj ĝin ĉirkaŭkreskis! Jen malhelverda, simila al paliĝinta veluro, jen griza kiel maljunula barbo, jen oreta kiel sur poplo aŭ saliko. La ŝelo de la kverko krevis je larĝaj kaj profundaj sulkoj, kaj kelkloke malmolaj fungoj ĝin kovris. Sed ankaŭ en tiuj kverkaj muskoj, en tiuj sulkoj, fungoj plene da vivo. Ĉi tie noktopapilioj tage satdormiĝas kaj ovojn metas, ĉi tie kuloj antaŭ la suna varmeĝo sin kaŝas, ĉi tie longpiedaj araneoj havas siajn ĉasejojn kaj kaptadojn aranĝas.

Kunflugis svarmoj da birdoj. Kanton de kantoj komencis la najtingalo. Merlo kaj oriole fajfas — ĉiu siamaniere. Upupo ie fore tamburas per obtuza voĉo. Turdo rapideme ŝirdeflugas de la arbo: „Ĉjo-ĉjo-ĉjo“ elkrias. Sur la supro de la pino grakadas la lazura koracio^{*)}, kiun la vento balancas.

Fringo finkantis sian mallongan strofon, ekripozis iom kaj denove ekkantas.

Kaj kiom ĉi tie da pepado, fajfado, zumado, iaj mallongaj, interrompataj voĉoj. Unu aŭdiĝas per: „Firluu“, alia per „Pii“. Tie oni aŭdas: „Fit-fit“, kaj aliloke: „Cit-cit“. Ie en foraĵo kelktempe ekriegos ankaŭ la korniko.

Alflugis la kukolo, eksidas sur la maljuna kverko, ekkriis: „Kukukuku“, balanciĝas sur la branĉetoj, falkuras inter la folioj, tiel ke la sciuro pro timo sur alian transsaltis arbon, eksidis sur du piedetoj kaj al la kukolo defore rigardas.

Ĉe supro de la maljuna kverko, en bela krono de folioj paro da kolomboj kveras, kaj samtempe laboreme konstruas la neston — veran paradizon: fortan kaj komfortan, molan, varman kaj sendanĝeran. Tiu ĉi nesto mokos kiel la kverko mem al la tempestoj.

Ĉe iom putriĝinta tubero de la kverka branĉeĝo eksidis jen pego, penege unu fojon post la alia forĝas per beko, elŝiras putrintan lignon, jetas ĝin flanken ĉar kabanon por si ĝi skulptas.

Iom malsupre upupo trovis jam pretan lokon por familia fajrujo kaj nur pri ĝia aranĝado sin okupas.

Oriolo dum tutaj tagoj kudras, plektas, remburas kaj formas la superteran palacon. Apud ĝi kardelo estas plektinta artecan korbon el iuj bastonetoj kaj pajletoj, kiujn la homo ne rimarkus, ne distingus sur la tero. Ne malproksime de la kverko en bluverda arbusto de junipero malgranda silvio ankaŭ estigis artverkon de teksado. Kaj sub arbusto en la herbo, sub la ombrelo de filiko, se vi atente enrigardos, si rimarkos nigran okulon de emberizo, kiu jam sur ovoj sidas.

Tradukis el la pola lingvo
Tadeusz Hodakowski.

^{*)} Koracio — pole: kraska, latine: Coracias, germane: Blaurocke.

MINACAS KRIZO!

En 34/1930 n-ro de Heroldo de Esp. ni legas, ke dum la unua laborkunsido de Oxforda kongreso s-ano Badois, reprezentanto de la Pariza Komerca Cambro demandas, kial esp. ne pli disvastigas ĝis nun kaj kion oni devas fari por pli disvastigi ĝin. Prezidanto s-ano Merchant aldonas ke, se oni deziras, ke ICK povu labori pli efike oni provizu ĝin per taŭgaj ideoj. En nro 359—360 de „Esperanto“ ni legas pri grava plano koncernanta ŝtatan enkondukon de esperanto. Ĉi sube publikigante la artikolon de dro A. Czubyński, kiu pritraktas kaj disvolvas la ideojn de s-ro Badois, Merchant kaj ICK, kiel lian privatan opinionon, ni rimarkas, ke ni eble ne kun ĉiuj ideoj de la estimata aŭtoro plene povus konsenti.

La Redakcio.

Dr. ANTONI CZUBRYŃSKI

delegito de UEA en Garwolin (Polujo), prezidanto de Pola Esperanto Societo en Varŝavo, lingva komitatano. (Adreso: Garwolin, Gimnazjum).

AVERTO KAJ ALVOKO AL VEKIĜO.

a) DIAGNOZO DE LA MALSANO.

Oni devas esti blinda por ne vidi, ke la ĝisnuna stato de propagando esp., se ĝi ne ŝanĝiĝos, ĝvidas rektavoje al krizo, aŭ eĉ al katastrofo. Oni tion ĉi povas pruvi statistike.

Kiam antaŭ milito post Bulonja kongreso en 1905 esperanto fine grandpaŝe ekmarŝis antaŭen, oni opiniis, ke eble dekelkaj jaroj, maksimume dudek sufiĉos por realigo de niaj songoj. Oni tro ne okupiĝis pri tiu-ĉi demando. Oni propagandis de la estrado, pere de artikoloj, prelegoj. Estis komence tiel multe por fari, ke ĉion pli malproksiman oni lasis al estonteco. Oni eldonis, kaj disvastigis multege da miloj da lernolibroj. Post fino de monda milito, kiam denove ekkomenciĝis la propagando, oni opiniis, ke ni estas tre fortaj, ke ni eble kalkulas jam milionojn. Antaŭ kelkaj jaroj prof. dro Joh. Dietterle fetis en Esperantujon fortan kaj gravan alvokon: „Ni kalkulu nin!“ El ĉiuj teranguloj kaj anguletoj venis la statistikoj kaj kun retenita spiro oni atendis la suman ciferon. Fine, en julio 1928 ni ĝin povis jam tralegi (nro 137 de ĝeneva „Esperanto“):

126.508 esperantistoj sur nia globo!

Pripensu Samideanoj! De la jaro 1887 ĝis 1928, sekve post 41 jaroj da senlaca komuna laboro de multego da esperantistoj, ni ricevas sumeton, per kiu oni povus loĝatigi mezgrandan urbeton. La homaro kalkulas 1.800 milionojn da kapoj.

Estos eble paradokso kaj tamen vero, se mi dirus, ke ofte pli objektivite pritraktas ian situacion la homoj starantaj ekster la movado, ol ni, starantaj aktive en la movado. La kaŭzo estas, ke la homo staranta ekster ĝi vidas ĝin en rilato al la tuta socia vivo. Jen tute alia aspekto: persono endroniĝinta en la vivo de la esp. societo elviviĝas pure en ĝi, havas okazon paroli, prelegi, aŭdi la lingvon parolatan praktike, eĉ ludi, ŝerci, danci. Li havas iluzion de io tre vigla kaj rapide disvolviĝanta. Post amuza vespero li eliras en la straton: ekster la societo rigida indiferenteco de neesperanta publiko, tuj preta moki tion-ĉi, kio por samideanoj estas ŝatinda, aŭ eĉ sankta. Antaŭ malfortvoja samideano videbliĝas du vojoj: unu mola, societa, luda; alia peza, de obstina kontraŭbatalado de indiferenteco. Estas malproporcio inter la interna vivanteco kaj ekstera indiferenteco, kiun samideanoj tro endroniĝintaj en societa vivo ne vidas.

Eksciu fine, Vi, Samideanoj, ke se Vi eĉ ĝis cerbtrasangumo laborus tag-nokte en Viaj societoj Vi nenion farus se la strato nenion scios pri Via laboro. Ĝi valoras nur tiagrade, kiagrade ĝi influas la neesperantistaron, kvankam societoj estas necesaj. Ni fine devas eliri el la societoj, kies vidaŭro estas limigita, kiuj estas la rimedo al la celo, neniam la celo. Esperantismo devas esti movado **socia**, ne **societa**. Societoj vartis la infanon, sed nun la infano devas eliri kaj fondi la memstarajn idojn.

Oni multloke konstatas, ke la societa vivo velkiĝas. Alproksimiĝas la krizo, kiun elsentas sentemaj samideanoj kaj eklegas inter la versoj el la ĵurnaloj, sed la krizo de propagandmetodoj, ne de la esperantismo.

Post la longdaŭra epoko de varbado de individuoj ni devas alpaŝi al pli komplika kaj pli respondema epoko de varbado de institucioj. Se ni ne kovros

la teron per la araneaja reto de institucioj favorantaj esperanton, se ni ne kapos ilin por favoraj rezolucioj al esperanto, tiam perdiĝos nia movado kaj esp. fariĝos lingvo de internaciaj grupetoj, ne la lingvo de nacioj. Ĝia nuntempa „internacieco“ estas momente nur uzurpo.

b) LA VOJOJ AL FORIĜO DE LA MALSANO.

Nune Vi samideanoj prenu la krajonon en la fingroj kaj kalkulu kun mi, ĉiu el Vi laŭ la cifero de la loĝantaro de sia lando. Mi, estante polo, kalkulas laŭ la loĝantaro de Polujo, kiu konsistas roncifere el 30 milionoj da homoj. Ni akceptu roncifere kaj teorie, ke 100 lertaj propagandistoj esperantaj subtenitaj de la ŝtata helpo kaj bona volo de la civitanoj instruas perfekte dum la jaro po 10 homoj ĉiu. Sekve estos.

100 x 10	—	1.000 post unu jaro
1000 x 10	—	10000 post du jaroj
10000 x 10	—	100.000 post tri jaroj
100.000 x 10	—	1.000.000 post kvar jaroj
1.000.000 x 10	—	10.000.000 post kvin jaroj
10.000.000 x 10	—	100.000.000 post ses jaroj.

Sekve pritraktante la demandon skeme, en idealaj kondiĉoj pola nacio esperantiĝus inter kvina kaj sesa jaroj de la forta kaj regula propagando helpata de la ŝtato. En malpli idealaj cirkonstancoj, en duoble aŭ trioble favoraj dum pli granda limtempo. Mi substrekas, ke tio ĉi estas skemo ne respegulanta realecon, ĉar la nombro 30 milionoj entenas ankaŭ suĉinfanojn, infanojn tro malgrandajn, maljunulojn kaj personojn ĝenerale ne bezonantajn duan lingvon krom nacia. Sed mi pritraktas ĉion skeme por ne kompliki la kalkulon. Cetere memkompreneble ĉiu lerninta esperanton ne taŭgas por ĝin instrui inter aliaj dek personoj. Sed skemo estas skemo!

Nune ni supozu alian situacion. Estas nenia ŝtata helpo, esperanton eklernas, kiu volas kaj nur dank' al privata iniciato de bonvolaj esperantistoj. Unuvorte nuntempa situacio. Ni kalkulu: 100 lertaj propagandistoj staras antaŭ 30 milionoj. Dividante unu ciferon per la alia ni ricevas, ke se la homoj estus senmortaj kaj la loĝantaro ne pligrandiĝus, ni bezonus 300.000 da jaroj por esperantiĝi la polan nacion, kaj se la cifero de propagandistoj estus 1.000 homoj ni bezonus 30.000 da jaroj. Sed la loĝantaro alkreskas kaj la propagandistoj mortas. Prof. van Benumeln kalkulas, ke ĉiu homo posedas 8 generaciojn malantaŭen, 256 antaŭulojn kaj post 30 generacioj alkreskas la nombro de antaŭuloj ĝis miliono. Kiamaniere kalkuli? Certe mi akceptis, eĉ skeme kalkulante, falsan bazon, ĉar kvankam ne ĉiu nova adepto instruas la alian, tamen nombro de novaj propagandistoj devus alkreski. Do oni devus akcepti kiel la principon dum la kalkulado la alkreskon de novaj esperantistoj kaj alkreskon de landa loĝantaro. La dua estas en Polujo tre vigla, unu el plej rapidaj en Eŭropo. Sed la alkresko de novaj esperantistoj estas malfacile kalkulebla, ĉar neniu zorgis pri statistiko, kiu cetere neniam estas certa, ĉar dum la sama jaro unuj personoj alvenas, aliaj foriras. Kion do preni por la principo en la prikalkulo? Mi ne scias. Certa estas unu, ke la kresko estas tre eta, se ĝenerale alkresko ekzistas. En la socio oni tute ne sentas tiun-ĉi alkreskon. Ofte oni eĉ pensas, ke esperanto ĝenerale ĉesis disvolviĝi. Kiamaniere ni kalkulus, unu ŝajnas esti certa, ke se esperanto alkreskus same malrapide, kiel ĝis nun, oni postulus kelkajn milojn da jaroj en plej favoraj cirkonstancoj por enpenetri en la tutan polan nacion kaj ankaŭ en aliajn naciojn. Tia situacio kompreneble gvidas al stagnacio, krizo, aŭ eĉ al katastrofo. Iom post iom „paŝo post paŝo“ malgrandiĝus la cifero de la societoj, velkiĝus ilia interna ideo, kion oni jam nun ofte povas konstati diversloke kaj fine pro manko da mono por pagi la loĝejojn, oni estus devigata likvidi la societojn. Oni eĉ ne scias, kiam kaj kie malaperus la societoj, kaj kio okazos kun ilia biblioteko kaj protokolibroj. Simile malaperis la societoj volapükistaj kaj se oni volus hodiaŭ skribi la historion de volapükista movado oni ofte troviĝus en malfacila situacio, volante trovi la necesan materialon por ĝia rekonstruo. Ĉu ne alie okazas nun kun esp. movado? Mi trafoliunas la jarlibrojn de „Pola Esperantisto“ de pasintaj, antaŭmilitaj jaroj. Mirinda, sed bedaurinde vera: mi legas pri la prelegoj, societoj, delegitoj en la lokoj, kie nun nenio ekzistas, pri „grandaj sukcesoj“, kie nun ĉio esperanta mortis.

Per la ĝisnuna vojo ni nenion gravan atingos.

Sola vojo estas jena:

Se iu ŝtato enkondukus devige esperanton en ĉiujn lernejojn de la lando, la civitanoj eklernintaj ĝin forveturinte eksterlanden trovus nur malgrandajn grupetojn. Tia vojo ankaŭ ne gvidas al la celo. Sed se 6 ŝtatoj enkondukus ĝin samtempe en la lernejojn kaj pri aliaj oni zorgus, ke ili faru la samon, la situacio en kelkaj jaroj ŝanĝiĝus. Por tio-ĉi estas necesa, ke la reprezentantoj de tiuj-ĉi landoj kunveturu kaj apud la sama tablo subskribu la **Akordon Interŝtatan pri samtempeco de enkonduko de esp. en la lernejojn**: „Ni... (poloj, ĉeĥoj, hungaroj, svedoj, k. t. p.) estas pretaj enkonduki esp. Zamenhofan en ĉiuj lernejoj de la lando kiel devigan le. nobjekton, se la samon konsentos minimume ses ŝtatoj fari ĉe si. La Akordo validas ne pli frue, ol kiam ses subskriboj estus kolektitaj”.

De la jaro 1920 mi klopodas por tiu-ĉi ideo. Oni diris al mi (prof. Dietterle, 1922): „se la ŝtatoj konsentus, tio-ĉi droniĝus nian movadon en la abismon”. Alia samideano en 1927: „Se Vi eĉ akirus tiujn-ĉi subskribojn, de kie Vi prenis la instruistojn por sendi ilin al ĉiuj lernejoj?” Mi respondas al ambaŭ riproĉoj: mi ja ne diris, ke mi pleniĝus ĉiujn lernejojn de la lando en unu, aŭ du monatoj per la instruistoj. Mi nur diris, ke de tiu-ĉi momento ni, helpataj de la ŝtato, povus alpaŝi al sistema preparo de instruistaj fortoj (dairu tiu-ĉi preparo eĉ kelkajn jarojn!) sed mi dirus al la kandidatoj ne kiel ĝis nun: „Vi lernu esp. ĉar tio-ĉi estas bela kaj bona ideo (kaj simile)” ...sed: „Vi lernu, ĉar Vi gajnos salajron kaj vivsubtenon”. Al la lernantoj mi dirus: „Vi lernu tiun-ĉi lingvon, ĉar pere de ĝi Vi estus komprenata en la tuta mondo”. Tiaj argumentoj sendiskute trafus al la koro kaj la spirito, ol niaj hodiaŭaj „grandaj sukcesoj”. Sekve mia propono ne gvidus al enabismigo de nia movado, sed al elabismigo de ĝi. Komenci per la preparado de instruistoj, ni ĉiam estas devigataj fari, ĉu per nia propra iniciato, ĉu kun la helpo de la ŝtato. Kial do rezigni pri la helpo de la ŝtato? Sen ĝi, ni enabismigos la movadon en kompletan stagnacion. Konstrui domon ni povas multajn jarojn, sed ni fine havu certajn fundamentojn! „Samtempeco” koncernas la komencon de preparaj laboroj sub firma ŝtata, ne la plenan realigon postulantantan kelkajn jarojn. La fundamentoj tamen ne estas certaj: dubadi pri esperanto pri ĝia paroblebleco, pri ĝia estonto, oni ankoratū nun povas, kiel antaŭ 40 kelkaj jaroj, kvankam pri io alia, ekz. pri kemio oni tion-ĉi fari jam ne povas. Ĝiaj fundamentoj estas jam firmaj. La grandskalan propaĝadon de Andreo Ĉe kaj de liaj sekvantoj en Svedujo ni ne trotaksu. Li vekas la entusiasmon por nia afero. Li semas la semon, sed se ni nur iom malzorgos la sulkojn, la laboro haltus, se ne post 3 jaroj, do post 5 aŭ 7. Lin devas sekvi la zorgemaj instruistoj en la lernejoj. Mi bone scias, kiel ofte inteligentaj homoj estas malinteligentaj en la lernado de lingvoj kaj de vortoj. Por ili necesus longa laboro. Andreo Ĉe gajnas nur animojn kiuj facile povas eklerni, entuziasmiĝi; aliaj restos en la ombro. Generale mi pretendas aserti, ke la ĝisnuna nia movado pli-malpli gajnis la spiritojn entuziasmemajn, altruistajn, sentemajn, kiuj ekzistis en ĉiu epoko kaj lando. Sed kiam temas pri transpaŝo de tiuj-ĉi al aliaj, malentuziasmemaj, praktikaj, sobraj, egoistaj, serĉantaj tuan profiton, oferantan nenion por afero ne donanta realan profiton, ni... ni haltos kaj ne iros pluen tiel longe, ĝis kiam ni ne donos ankaŭ por tiuj-ĉi spiritoj ion, kio povus ilin kontentigi.

* * *

Aĝado de Internacia Centra Komitato (ICK) kaj precipe de dro E. Privat en diplomataj sferoj por realigi tiun-ĉi ideon de Akordo Interŝtata donis precipe en la jaro 1926 bonajn rezultojn, sed malbona ilia flanko estis, ke kiam oni parolis kun la ministro de iu lando, kaj preparis sin por la pridiskuto de la demando kun la ministro de alia lando, la kabineto de unua lando cedis kaj oni devis komenci denove la laboron kun la alia, kiu pri nenio sciis. Favoraj por tiu-ĉi ideo estis la polaj ministroj en la unua duono de 1928 jaro. Ni fine ekkomprenis, ke decida estus la opinio de la ministerio, ne nur de la ministroj. En la jaro 1929 ICK decidis haltigi la laboron „pro malfavoraj politikaj cirkonstancoj”. Sed kiam en unua duono de 1929 elpaŝis franca ministro por eksterlando Aristides Briand kun la propono de Unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo, tiam la ideo fariĝis denove aktuala sendepende de tio ĉu la ideo de A. Briand estis realigebla, aŭ momente nerealigebla. Nek unu artikolo en orĝano de UEA menciis pri la graveco de ambaŭ ideoj kaj pri ilia rilato. Tiam Pola Espe. anto Asocio elpaŝis per malfermita letero al ministro A. Briand (oktobro 1929 en Pola Esperantisto nr. 10), kiu tradukita de francaj samideanoj estis publikigita en variza ĵurnalo. Estante lojala al ICK mi tute ne samopinias kun ĝi pri nenion-farebleco en kuranta

epoko, kiu de la momento de elpaŝo de A. Briand rapide ŝanĝiĝas kaj devigas nin al vigleco. Se ICK ne volas elpaŝi, ĝi atendu la cirkonstancojn pli (laŭ ĝia opinio) favorajn. Sed mi laboros kaj preparados laŭpove la grundon, kies spikaron rikoltos ICK, aŭ aliaj niaj aŭtoritatoj. Tion-ĉi malgraŭ mia lojaleco neniu povas al mi malpermesi preparadi.

(Finota).

23-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Kraków 1—8 aŭgusto 1931.

OFICIALA BULTENO.

14 APRILO 1931.

Adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Kraków, Lubicz 34, Pollando.
Kotizo: Zł. 44.—; Infanoj ĝis 14 jaroj Zł. 11.—; Helpkongresanoj, kiuj ricevas ĉiujn kongresajn dokumentojn, sed ne partoprenas en kongresaj aranĝoj Zł. 22.—; Blinduloj ne pagas kotizon. —

Pagmaniero: Per poŝtĉeko, poŝtmandato, bankĉeko, monbiletoj, en registrita letero. Plej oportuna pago estas pere de Pola Poŝtsparkaso (Pocztowa Kasa Oszczędności) al nia konto: 23. Universala Kongreso de Esperanto, Kraków Nro. 410.975.— Senpera transpago estas ebla el: Aŭstrio, Belĝujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavio, Latvujo, Nederlando, Svedujo kaj Svisujo. — Kongresa banko estas: Bank Gospodarstwa Krajowego, filio Kraków.

Garanta kapitalo: Ni petas deklari bonvolan sumon por kovro de eventuala defecito.

Donacoj. LKK volonte akceptos donacojn, por plensukcesigi la kongreson. **Pagis:** s-ino J. Neubergowa zł. 10.— Sumo: 127.40 zł.— Ni korektas eraron, ke pagitaj sumoj de K. Bujwidowa, K. Rouppertowa, R. Weinsberzanka, M. Salamon apartenas al blindula Kaso.

Blindula kaso. Por ebligi al niaj blindaj samideanoj senpagan partoprenon la LKK kun danko akceptas ĉiujn mondonacojn por tiu ĉi celo. **Pagis:** J. Neubergowa zł. 13.—; B. Głuchowski zł. 2.—. Sumo zł. 93.—.

Kongresmarko: Estas eldonita bela trikolora glumarko, kiun ni petas ofte uzi por multe propagandi la Kongreson. Unu folio kun 28 pecoj kostas Zł. 1.

Ilustritaj poŝtkartoj de Kraków: Albumo kun 8 kartoj kostas Zł. 1.

Loĝado: Aparta mendilo estas sendata al ĉiuj aliĝintoj. Por orientiĝo de la kongresanoj ni donas ĉi-sube la prezojn:

Hoteloj: Kategorio A 1-lita Zł. 15—18.50, 2 lita Zł. 25—34.

Kategorio B 1-lita Zł. 10—14.50, 2-lita Zł. 18—24.

Kategorio C 1-lita Zł. 8—9, 2-lita Zł. 13—17.

Kategorio D 1-lita Zł. 6, 2-lita Zł. 11.50.

Pensionoj: Loĝado, maten-kaj tagmanĝo. Kat. A Zł. 12. Kat. B Zł. 11.

Privataj loĝejoj: Kat. A Zł. 8, B Zł. 7, C Zł. 6, D Zł. 5.

Komunaj loĝejoj: Zł. 2—4.

La cititaj prezoj entenas jam servadon, trinkmonon, en kelkaj hoteloj ankaŭ matenmanĝon.

Manĝoj: Matenmanĝo Zł. 1—1.50, tag- kaj vespermanĝo 2—3 sen trinkaĵo.

Fervoja rabato: Ĉiu kongresano ricevos ĝustatempe specialan rajtigilon por profiti el 50 proc. rabato sur polaj fervojoj antaŭ kaj post la Kongreso.

Pasportoj: Ĉiu kongresano devas posedi pasporton. Pola vizo en ĉiuj landoj senpaga.

Ekskursoj. Ili okazos dum kaj post Kongreso. Specialaj mendiloj estos sendataj.

Ojców. Duontaga ekskurso per aŭtobusoj al tre pitoreska valo kuŝanta inter rokoj. Malgranda eltranĉaĵo de svisa pejzaĝo. Vizitado de grottoj. Manĝo en libera aero. Vespere reveno per aŭtobuso al Kraków. — Kosto de la ekskurso kun manĝo ĉirkaŭ zł. 8.—.

Tyzniec. Duontaga ekskurso per ŝipo al monaĥejo de Benediktanoj el XI jrc. Vizitado de ruinoj. Veturo al Grodzisk, kie manĝo kaj reveno al Kraków. — Kosto de la ekskurso kun manĝo ĉirkaŭ zł. 7.50.

Wieliczka. Duontaga ekskurso al fame konata, plej malnova en Eŭropo salminejo, profunda je 7 minejaj etaĝoj. Vizitado de la minejo kun ĝiaj kapeloj skulptitaj en salo. Manĝo en unu el salaj grottoj. — Kosto de la ekskurso kun manĝo ĉirkaŭ zł. 7.—.

Ĉiuj ĉi supraj ekskursoj okazos dum la kongresa semajno.

Zakopane. Unutaga ekskurso al centro de polaj montaroj Tatry, ĉefa turista stacio. Veturo per aŭtobusoj al Morskie Oko, lago kuŝanta 1.400 m. alte inter nealireblaj rokoj, kie vivas agloj kaj ĉamoj. — Kosto de la ekskurso kun tuttaga vivtenado kaj ĉiuj veturprezoj ĉirkaŭ zł 45.— (III klaso), zł 50.— (II klaso).

Pieniny. Dutaga ekskurso per fervojo al Zakopane, kie la programo estos la sama kiel ĉe la ekskurso al Zakopane. Duan tagon per aŭtobuso al Czorsztyn, 4-hora vojaĝo per boatoj sur la rivero Dunajec kaj reveno al Zakopane. — Kosto de la ekskurso kun 2-taga vivtenado, noktejo kaj ĉiuj veturprezoj ĉirkaŭ zł 95.— (III klaso), zł 100.— (II klaso).

Warszawa. Dutaga ekskurso al ĉefurbo de Pollando por partopreni en aranĝoj de la Postkongreso. Vizitado de la urbo per aŭtomobiloj kaj vizitado de Wilanów. — Kosto de la ekskurso kun 2-taga vivtenado, noktejo kaj ĉiuj veturprezoj zł 105.— (III klaso), zł 112.— (II klaso).

Fakaj kunvenoj. Ĝis nun estas anoncigitaj jenaj kunvenoj de: virinoj, muzikistoj, pacifistoj, poŝtistoj, vegetaranoj, paneŭropanoj, Internacia Scienca Asocio. — LKK petas la aranĝantojn pri frua anonco, ĉar aliokaze ni ne povas garantii la aranĝon.

Karavanoj: Estas anoncigitaj karavanoj el Berlin, Beograd, Budapest, Danzigo, Milano, Parizo, Stockholm.

Grava peto: Ĉiuj aliĝantoj kaj korespondantoj estas petataj skribi sian nomon kaj adreson tre legeble kaj ĉiam ripeti la adreson.

Tadeusz Hodakowski, ĝenerala sekretario.

TRIA INTERNACIA PEDAGOGIA KURSO DE ESPERANTO GVIDOTA DE PASTRO ANDREO CSEH EN KRAKÓW.

Oficiala Bulteno.

Generalaj informoj. Kiel sciante la nunjara Internacia Pedagogia Kurso de Esperanto gvidota de pastro Andreo Ce okazos antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Kraków. La kurso daŭros de la 20 julio ĝis 1 aŭgusto. Partopreni ĝin povos tiel personoj konantaj esperanton samkiel tute ne konantaj ĝin. Ĉar la kurso estos „pedagogia“, celanta diskonigi mirindan metodon de pastro Ce kaj kapabligi por instrui Esperanton, plej volonte estos vidataj la profesie instruistaj sferoj kaj personoj instruantaj Esperanton, ĉetere oni akceptas al la kurso ĉiujn sinanoncintojn.

Kotizo por la tuta kurso estas fiksita je 20 zł. Oni sendu ĝin laŭ la adreso de Universala Kongreso de Esperanto indikante la celon. Pri pagmaniero bonvolu legi koncernan ĉapitron en la ĉi supra kongresbulteno.

Kursejo. Por la kursejo estas mendita granda prelegejo en Muzeo Industria ĉe la Smoleńsk-strato 9.

Loĝado kaj manĝo. Pri tio ĉi bonvolu legi koncernajn ĉapitrojn en la kongresbulteno.

Fervoja rabato kaj pasportoj. Organiza Komitato de la kurso klopodas, ke la kongresaj favoroj ampleksu ankaŭ la kursanojn. Detaloj baldaŭ sekvos.

Programo de la kurso. La lecionoj (aŭ konversaciaj horoj, kiel preferas nomi ilin pastro Ce) okazados antaŭtagmeze. Posttagmezoj kaj vesperoj estas destinitaj por diversaj ekskursoj, vizitadoj de la urbo kaj ĝiaj vidindaĵoj kaj aranĝoj celantaj agrabligi al la kursanoj la restadon en la urbo. Pli precizaj detaloj estos ĝustatempe diskonigitaj.

Propagando de la kurso. Oni petas ĉiujn Esperantistojn, kaj speciale la ĝeinstruistojn, ke ili bonvolu divstavigi tiujn ĉi informojn pri la okazonta kurso per la landa gazetararo. Aparte atentinda estas la faka ĵurnalaro instruista. Veku inter tiuj sferoj intereson por la bonega metodo.

Esperantistan kaj nacilingvan gazetaron ni kore petas urĝe represi niajn bultenojn, por tiamaniere helpi nin en nia poreesperanta laboro.

Organiza Komitato.

INTERNACIA ESPERANTA POSTKONGRESO EN WARSZAWA.

HONORAN KOMITATON eniris reprezentantoj de la registaro, urbestro, scienco k. t. p. La detala listo sekvos en unu el la plej proksimaj bultenoj.

HONORE al Majstro estos enmurigota memortabulo ĉe la ĵus nomigita strato Zamenhofa 9 kaj honore al Antoni Grabowski — ĉe la strato Hoża 40.

Por tiu celo oferis 1) s-ro K. Tyminski, Nowogródek 25 zlotojn kaj 2) prof. O. Bujwid, Kraków 20 zlotojn. Pluaj oferoj estas danke akceptataj.

PROGRAMO de la Postkongreso antaŭvidas ankaŭ grandan solenaĵon sur la tombo de d-ro Zamenhof, kie reprezentantoj de la Tutmonda Esperantistaro honoros sian Majstron, koncerton, gvidadon tra la muzeoj, kasteloj, vidindaĵoj k. t. p.

KOTIZAJO por persono estas 8 (ok) zlotoj aŭ egalvaloro. Post la 1-a de julio — 12 (dekdu) zlotoj aŭ egalvaloro. Studentoj kaj lernantoj, posedantaj konformajn legitimilojn je 50 proc. malpli. Do aliĝante tuj vi ŝparos al vi monon kaj al ni — la laboron.

ALIGILOJ estas riceveblaj pere de gravaj naciaj esperantaj organizaĵoj, gazetoj aŭ senpere de la Organiza Postkongresa Komitato.

VIVKOSTOJ en Varsovio, kiel ĝenerale en Polujo, estas malaltaj. Dum la lasta tempo multaj prezoj estas pli malaltigitaj. La Organiza Postkongresa Komitato klopodas pri tre malmultekostaj loĝejoj.

ADRESO: Internacia Esperanta Postkongreso en Varsovio (Polujo) Wiodok 19, telefono 234-84. Poŝtĉeka konto 25390 (s-ro Józef Litauer) Varsovio.

REPRESO de tiu ĉi bulteno estas tre petata.

JAM NUN ALIĜU AL LA POSTKONGRESO EN VARSOVIO!

La Organiza Postkongresa Komitato.

La X-a Internacia Tendaro de la Skolta Esperantista Ligo

okazos 14 — 20 julio 1931 apud Budapeŝt, Hungarlando laŭ invito de la Hungara Skolta Ligo, kiu prizorgos por tiuj, kiuj anoncos sin plej malfrue en majo, rabatojn sur fervojoj. Multaj skoltoj lernas Esperanton por ĉeesti la Tendaron. La Internacia Kunveno de Skolt-gvidantoj okazos tuj post la Tendaro en najbarlanda Vieno. En Hungarlando pli multe ol cent skoltoj studas Esperanton, ankaŭ en Anglujo, Francujo k. t. p. La Hungara Skolta Ligo kaj Brita S. L. disdonas premiojn al la trupoj, kiuj atingos la plej bonan progreson en la lingvo-scio kaj eksterlanda korespondo. Oni esperas, ke multaj skoltoj post fermo de la Tendaro alveturos Krakovon je la XXIII-a Internacia Kongreso de Esperanto.

POLLANDA KRONIKO

WILNO. Senpere de la latva limo la Hindu S-ro Sinha alveturis Vilnon vendrede la 27-an de marto je la 8,35 h. matene. — La gaston salutis sur la perrono sekvantaj reprezentantoj: en la nomo de U. E. A. la vilna deligito S-ro K. Gersäter, en la nomo de Akademijaj Rondoĵoj en Polujo prezidanto de Vilna Esperantista Rondo Akademia (V. E. R. A.) s-rano M. London, en la nomo de S-to „Universo“ profesoro de mnemoniko D. Fajnsztejn kaj en la nomo de Pola Esperanto Asocio juristo S-ro J. Baceviĉ. — La alvenmomento de S-ro Sinha Vilnon estis fotografie fiksita. — De la stacidomo S-ro Sinha veturis al loĝejo de profesoro de U. S. B., J. Muszyński (kuratoro de V. E. R. A.), kie lin akceptis, kaŭze de foresto de la profesoro, lia edzino. — Post tagmanĝo okazis „Teo Esperantista“, organizita de V. E. R. A., kie S-ro Sinha tre interese rakontis pri la vivo de nuntempa Hindujo. La gasto deklamis esperantlingve kaj sanskrite la verkojn de sia majstro — Rabindranath Tagore. La ĉeestantoj estis ravitaj de la flueco kaj simpleco de parolo de S-ro Sinha. — Sabate je la 7 horo matene S-ro Sinha forveturis al Nowogródek. — Pri la restado de gasto en Vilno la lokaj gazetoj enpresis detalajn menciojn.

NOWOGRÓDEK. La unua en Pollando prelego de hinda instruisto Lakshmisvar Sinha okazis la 28-an de marto en Nowogródek, kien la preleginto alvenis el Latvujo nur tranoktinte en Wilno. Kvankam la horo de la prelego (15-a) ne estis por multaj oportuna, tamen la prelego estis bonsukcesa. La prelego estis pofraze tradukata de tiea delegito de U. E. A. ing. M. Chmieliński, kiu mirigis ĉiujn per sia lerteco de tuja tradukado. Ĉe fino de la prelego estis de publiko farataj multaj demandoj, kiuj tuj estis respondataj de la preleginto. Ĉeestis ĉirkaŭ 200 ĝehomoj, el kiuj pli ol triono estis ĝelernantoj. Post la prelego ilustrita per lumbildoj la preleginto estis sieĝata de dezirantoj de lia subskribo. La prelego aranĝita de Asocio de Civitanaj Virinoj vekis grandan interesigon kaj postlasis bonegan impreson. Ebla estas invito prelegi maje.

BARANOWICZE. La dua kaj tria prelegoj de Lakshmisvar Sinha okazis 29. III, en Baranoviĉe, kien li estis veninta kun sia tradukinto ing. M. Chmie-

liński el Nowogródek. Pro neoportuna horo (13) kaj nesufiĉe bona propagando ĉeestis nur pli ol cent personoj. Tamen interesiĝo estis granda. La prelego estis aranĝita de Asocio de Civitanaj Virinoj kaj de Militista Familio. Generalo Skotnicki mem invitis preleginton kun tradukinto en sian hejmon, kie oni pasigis kelkajn horojn en pli intima rondo. Ravite de nia gasto la generalo petis alveni por prelegi en majo ĉe fino de rondvojaĝo. Post vespermanĝo ĉe delegito de U. E. A. s-o A. Gelfand estis dua prelego por Hebreoj, tradukita de samideano Malachowski, kaj aranĝita de Hebrea Societo de Sanprotecto TOZ. La salono estis preskaŭ duonplena kaj la prelego multe ĉiujn interesigis.

NIESWIEŻ. La kvara kaj plej sukcesa prelego de la hinda instruisto Lakshmisvar Linha okazis en Nieswież la 30. III. kien li kun sia antaŭa tradukinto inĝ. M. Chmieliński alvenis el Baranoviĉe. Pro konvena horo kaj bona organizo la sukceso estis neatendita. Ĉeestis pli ol 370 personoj el kiuj pli ol 200 estis gelnantoj. La prelego estis aranĝita de Asocio de Civitanaj Virinoj kaj Societo de Virinakomodo por Landodefendo. Interesiĝo kaj entuziasmo estis grandega. Post trihora prelego sekvis duhora tetrinkado en pli intima rondo de direktoroj lernejoj kaj aliaj personoj. Sekvanta prelego por majo jam invitita. La preleginto vizinte kastelon de Radziwill forveturis tagmeze al Bialystok sekvantan tagon.

BYDGOSZCZ. Monata marĉa kunveno de „Societo Esperanto” kun interesa prelego de s-ano Pankratz pri „La nuna stato de la francaj kaj belgaj battalkampoj”. Fondiĝis „Scienca Esperanta Rondo”. La estraro konsistas el la sinjoroj Prof. Sygnarski, pastro Prof. Kukułka, Krzysztofowicz, f-ino Michalakówna, s-roj Stefan Fethke, Prof. Wojciechowski, Prof. Dr. Peliński, Inĝ. Juszkiewicz, komercierneja dir. Skalski. Dum inaŭguracia kunveno parolado de Jean Forge pri „La lingva spirito de Esperanto”. — Kurso de s-ro Prengel inter geartistoj de la urba teatro. Du novaj kursoj de Fratoj Fethke por komencantoj kaj progresintoj. La hinda Sinha parolos en Bydgoszcz la 23-an de aprilo k. j. Oni krome decidis aranĝi kaŭze de la mortotaga datreveno Zamenhof-memorfeston kaj inviti la svisan, nunan kalifornian esperantiston, s-on Scherer por propagandparolado en aŭtuno k. j.

CHORZÓW. Societo-Esperanto komencis la 9-an IV. novan Esperantokurson. La 25-an III. k. j. okazis en la restoracio de s-o Marcinek jarkunveno de la Societo. Estas elektita nova estraro, kiu konsistas el: s-oj Czaja kaj f-ino Odyga. — prezid., s-oj Staniek kaj de Martin — sekr., s-o Bywalec kaj f-ino Bugdańska — kasist. Kasrevizoroj: s-oj Pogoda, J. Cat Berro kaj f-ino Wolna, Delegitoj: s-oj Czaja kaj Staniek, Bibliotekistinoj: f-inoj Czaja kaj Staniek, Konsulantoj: s-oj Pogoda kaj Pańczyk.

CZELADŹ. Prelegon s. t. „Esperanto en uzo de laborista klaso” aŭdigis s-o B. Czechowski. Partoprenis 25 membroj de TUR. La kurso ne komenciĝis pro reganta ĉi tie senlaboreco kaj monmanko por pagi la gvidanton.

KRÓLEWSKA HUTA. Rondo Esperantista aranĝis 1. 2. sian ĝen. kunvenon. La estraron eniris: prez. S-ro E. Kołodziej, vicpr. S-ro B. Gerlich, sekr. J. Weihs, kas. K. Plona, bibl. J. Kocek. Konsil. S-ro D-ro H. Broder, S-ino Kompała. Rev. Kom. S-roj: M. Paruch, Kompała, Sadło. — La biblioteko de R. E. konsistas el 85 libroj. En la pasinta jaro oni aĉetis Esp. librojn, lernolibrojn k. a. esperantajojn por la sumo de 540 zl. — S-ro D-ro Broder faris referaton pri la nuna situacio de la Esp. movado kaj menciis i. a., ke por sukcesigi la 23-an Univ. Esper. Kongreson en Kraków kaj la 5-an Tutpollandan Esp. Kongreson en Katowice, estas necese, ke ĉiuj en Silezio ekzistantaj Esp. grupoj laboru unuigite kun la Ligo Esperantista. — En Król. Huta oni gvidas 3 Esp. kursojn kun pli ol 75 p. kaj unu perfektigan kurson.

ŁÓDŹ. La 25. de januaro prelegis en ejo de Gimnazio de Piłsudski f-ino Lidja Zamenhof en pola lingvo pri esperanto. Post la prelego — provleciono laŭ Ce-metodo. Ĉeestis ĉ. 200 personoj. La saman tagon vespere en ejo de Lodza Esperanto Societo la gasto faris prelegon esperantlingvan, kiun aŭskultis ĉ. 200 esperantistoj. — L. E. S. gvidas konstante du komencajn kursojn. La 18 de februaro okazis ekzameno, kiun partoprenis 50 absolventoj de finiĝintaj du grupoj. La kurso ĉe la lodza skoltaro — en organizo.

Dum la lasta ĝenerala jarkunveno de L. E. S. oni elektis krom la estraro, konsistanta preskaŭ el la samaj personoj, kiel en pasinta jaro, honoran membron — s-on d-ron Jan Mędrkiewicz pro kies forveturo el Łódź nia loka movado perdis unu el siaj plej gravaj, plej eminentaj gvidantoj. — E-movado en Łódź progresas senhalte. Kursoj estas gvidataj seninterrompe. Baldaŭ okazos ankaŭ

perfekta kurso kaj estas eĉ planataj rapidkursoj speciale por partoprenintoj de la Krakova Kongreso.

SOSNOWIEC. La 15. III. en ejo de urba lernejo okazis publika ekzameno por partoprenintoj de la 3-monata kurso gvidita laŭ senpera metodo. La kurson organizis EDZ. Partoprenintoj 20. Gvidis s-o J. Goldfarb veninta el Hungarujo kaj ne konanta polan lingvon. Ekzamena komitato konsistis el s-oj; Dro H. Broder el Katowice, Dro A. Ingster — prezidanto de EDZ, Bol. Czechowski — sekretario kaj s-o Cz. Rabenda del. de EDZ el Dąbrowa. La alvenintaj instruistoj kaj gastoj laŭdaprobis la metodon konversacian aplikatan sen helpo de lernolibro kaj pola lingvo de la unua ĝis lasta lecionoj. La partoprenintoj flue respondis al ĉiu demando de la Komitato kaj rakontis impresojn de la lastaj tagoj. Ekzamen-atestojn ricevis 13 personoj. — Opinion de la instruistaro esprimis s-o prof. S. Płocki substrekante, ke, kvankam li ne konas esperanton, li povis libere kompreni kaj kontroli kuron de la ekzameno, komprenante preskaŭ ĉion. — Gastoj kaj la partoprenintoj esprimis sian kontenton kaj rekonon por EDZ por la iniciato kaj enkonduko de la senpera instru-metodo, alkiutimiganta la lernanton tuj de la komenco al stilo kaj Esperanto-pensmaniero. — **Esperanto Klubo**, nun tre vigla, estas organizinta duan kurson laŭ senpera metodo por 35 partoprenantoj kaj superan por 14. Gvidas ilin s-o J. Goldfarb. La kursoj estas pagataj po 5 zł monate. Dum malfermo de la kurso prelegis publike s-o B. Czechowski s. t. Esperanto kiel disvastiganto de la kulturo. Ĉeestis 80 personoj. — La revuo „Pomocniczy Język Światowy” estas bonvenigita kiel tre utila kaj baldaŭ estos aranĝita ĝia kolportado.

WARSZAWA. La 26-an de marto okazis jara kunveno de Konkordo. El la raporto, prezentita de la estraro, vidiĝis, ke la Rondo okazigis en la lasta jaro 6 propagandajn prelegojn kun provlecionoj; ĉiumarde funkcias klubo kaj biblioteko; en aŭtuno 1930 estis aranĝita la unua en Konkordo Cseh-kurso, sukcese gvidita de f-ino Lidja Zamenhof. — En la estraron eniris: Benjamin Weinthal, dr-ino Paulina Muszkatblatt, Emilja Hermelin, Melanja Szenfeld, Ewa Szatz, Lidja Zamenhof, Henryk Bronstein.

ALVOKO.

S-o Géza BERKI, direktoro eĉ la Landjuĝistaro, del. de UEA en Debrecen. Kir. Tábla. Hungario — kolektas informojn pri superstiĉoj, popolkutimoj kaj naciaj proverboj por prilabori ilin en naciaj kaj esp. gazetoj kaj eĉ en libroj. Li ricevis ĝis nun jam sufiĉe ampleksajn materialojn, sed el Polujo ankoraŭ nenio venis, tial ni petas pollandajn samideanojn, ke ili bonvolu tion tuj fari interrilatigante kun s-o Berki por ricevi precizajn detalojn pri liaj deziroj.

DE LA REDAKCIO.

Kelkajn demandintojn pri sorto de la vortaraldono ni sciigas afable, ke pluan aperigadon de ĝi ni devis prokrasti ĝis la kongreso, ĉar 1) nun mankas al ni loko kaj 2) PE kiel organo de LKK estas grandkvante ekspedata eksterlanden, kie la aldono estus tute senutila.

Prof. O. Bujwid forveturis al Svedujo, Danujo kaj Germanujo por aŭdigi tie kelkajn propagandajn prelegojn en Esperanto.

Tadeusz Hodakowski, kunredaktanto de P. E. kaj lektoro de Esp. ĉe la Universitato en Kraków estas elektita membro de la Lingva Komitato (LK).

S-o G.-K. el P. bonvolu indiki nomon de la aŭtoro skribinta la rakonton: „Familia nesto”.

Kvankam la artikolo s. t. „Minacas krizo” estas tre longa, ni tamen enprezis ĝin sen mallongigoj kaj dividante ĝin nur por du numeroj, ĉar la ideoj tuŝitaj de la aŭtoro estas tre gravaj kaj vere pripensindaj.

Lastmomente P. E. .D. ricevis proponon de I. C. K., ke s-o Scherer povus veni al Polujo antaŭ la kongreso, jam 15-an de julio. Oni urĝe petas la grupojn pri koncernaj sinanoncoj. (Ĉetere legu la ĉefartikolon).

Gustigo. En la pasintmonata n-ro de P. E. pĝ. 41. § 2 de la „Klarigoj” enŝteliĝis eraro. Devis esti: „dum 8—10 dimanĉaj vesperoj”.

LEO TURNO:

Kompletny Podręcz. j. Esper.	zł. 1.25
(dla początkujących)	
Supera kurso de Esperanto	zł. 2.—
(Wyższy kurs j. Esperanto)	
Czytanki Esperanckie	zł. 1.50
(Anekdotaro)	

Do nabycia we wszystkich księgarniach.

Polskie Akademickie T-wo Esperantystów — Warszawa
prowadzi

Kurs korespondencyjny języka Esperanto.

Kurs polega na tym, że uczestnik jego otrzymuje podręcznik języka Esperanto, podzielony na 12 lekcji, przerabia co tydzień jedną lekcję, tłumaczy ćwiczenia z Esperanta na polski i odwrotnie, poczem przesyła je do poprawienia.

Aby zostać uczestnikiem kursu, należy wpłacić zł. 15.— Opłata ta obejmuje całość kursu wraz z samouczkiem, poprawą przerebionych ćwiczeń i przesyłkami pocztowymi.

Opłatę oraz ćwiczenia (przysyłane w zeszytach) należy kierować pod adres:

**Polskie Akademickie T-wo Esperantystów, Warszawa,
Leszno 99. m. 5.**

ACĈETU TUJ!

La granda, oficiala libro pri la tragedia, nordpolusa ekspedicio de la svedo Andrée en la jaro 1897, kies restaĵojn oni trovis 1930 en la polusa maro —

„PER BALONO AL LA POLUSO“

estas la plej atentinda verko ĝis nun aperinta en Esperanto. Enhavas la taglibrojn de Andrée mem kaj liaj kamaradoj. 416 paĝoj. 115 bildoj. Prezo broŝ sved. kr. 9.—, bind. 11.50; aŭfranko 0.50.

Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1. Svedujo. Poŝtĉeka konto 578.

Poloj aĉetu ĝin ĉe Admin. de „Pola Esperantisto“; prezo zł. 23.60 kun aŭfranko

Konto PKO. 406.660.

ATENTU!

Internacia Esperanto-Muzeo

ĉe

„National-Bibliothek in Wien“.

(adreso: Wien I., Neue Burg, Heldenplatz)

serĉas por kompletigo de kolektoj sekv. numerojn de „Pola Esperantisto“: de la unua jarkolekto de n-ro 8 el 1907 ĝis la komenco de la 3 jarkol. el 1908; n-ro 11 el 1912; n-ro 115 el 1925; n-oj 129 kaj 130 el 1926. Kiu havigos ilin?

LIBREJA FAKO „POLSKIEGO ESPERANTYSTY“

Kraków, Lubicz 34. Konto PKO 406.660.

poleca bogaty wybór dzieł naukowych, beletrystycznych, propagandowych,
samouczków i t. p.

Katalog na żądanie wysyłamy bezpłatnie.

U w a g a !

Obowiązkiem każdego Esperantysty jest rozpowszechniać jedyny miesięcznik w języku polskim, poświęcony wyłącznie propagandzie Esperanta:

„Pomocniczy Język Światowy“.

Pozyskujcie jak najwięcej abonentów, bo od tego zależy dalszy żywot pisma. Abonujcie nie tylko dla siebie ale i dla swoich znajomych, starajcie się, by pismo znajdowało się zawsze do przegłądnięcia we wszystkich czytelnich, poczekalniach, restauracjach, kawiarniach i t. p.

Abonament wynosi tylko zł. 2.40. Możliwy też abonament miesięczny. Wpłaty skutecznie można na konto: „Polski Esperantysta“ P. K. O. 406.660.

Adres dla korespondencji: Kraków, Lubicz 34.

NOWOŚCI

NOWOŚCI

500 SŁÓW JĘZYKA ESPERANTO

10 LEKCYJ METODĄ PRZYSPIESZONĄ BRACI FETHKE

Jest to pierwszy kompletny podręcznik, który różni się od dotychczasowych podręczników polskich swoją nawskróś nowoczesną metodą. Każdy, który prowadzi kurs, powinien natychmiast zapoznać się z naszą metodą, która daje możliwość nauczania Esperanta w bardzo przyspieszonym tempie! Metoda — zanim wyszła drukiem — została praktycznie wypróbowana w szeregu kursach, w miarę potrzeby udoskonalona i doprowadzona do obecnej formy.

Panom „kursestroj” wysyłamy na żądanie 1 egz. okazowy po wyjątkowej cenie 1.— zł. Przy zamówieniu większej ilości naszego podręcznika udzielamy wysokiego rabatu.

Komplet 10 lekcji wraz z słówkami w karton. tece (format 21x33) 1,50 zł.

BRACIA FETHKE, BYDGOSZCZ, PETERSONA 11.

Do niniejszego n-ru „Polskiego Esperantysty“ dołączamy jako bezpłatne dodatki:

- 1). Cennik „Libreja Fako de Pola Esperantisto“
- 2). Kartę wpisu (aliĝilo) na XXIII. Kongr. Esp. w Krakowie.

NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON POR J. 1931!

Paĝu la abonon je nia konto PKO 406.660.

Abonu mem kaj varbu novajn abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!

Abonu la polan propagandan revuon „Pomocniczy Język Światowy“.

Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, Stolarska 6.